

# PENSEO

N-ro 168

okt./2005

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 16-a jaro <http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm>

## SINJORO YE, la amanto de vino

**Guozhu**

Sinjoro Ye, la amanto de vino,  
drinkema, sed bonvirta kaj humura,  
droninta en vin-etoso kultura.  
Lia kvadrata korto en Pekino

allogas ĉiam per sorĉa fascino  
de franda menuo kaj bel' natura.  
Sinjoro Ye, la amanto de vino,  
drinkema, sed bonvirta kaj humura.

Komplezo de la gastama mastrino,  
esperantista bofranjo figura,  
spicis Bakĥanalion pli plezura.  
Ebrie dancas rave je la fino

Sinjoro Ye, la amanto de vino!

Leginte la mirindan eseon "SINJORO YE, la amanto de vino", verkitan de Qi Jian, mi ja devas iel eĥi, do versis rondelon kiun mi humile donacas al kara samlokano-samideano Ye Nianxian.

. 2005-09-15 (Tri tagojn antaŭ la Mez-aŭtuna Festo de 2005.)

**Hosemo**

## ALA FABLE SINJORO SCETO

Kun granda plezuro mi kore salutas  
Afablan sinjoron kaj ankaŭ gaj-flutas.  
Reravas profunde min via fervoro,  
Admiras mi vian sukceson per floro.

Frateca prizorgo varmigas min ĉiam,  
Revokas min ame vi iam kaj iam.  
Agrablaj paseoj freŝadas en koro,  
Tra l' mondo vi brilas pro via valoro.

Oldulo plenvigla senlace laboras,  
Sed mi malproksima kuŝeme langvoras.  
Celadas vi pene por nia afero.

Elstaras vi verki kun bela espero.  
Tenera instruo min spronas sincere,  
Ordonon de Sceto mi sekvos prefere.



**Ĉineske**

## AL HU GUOZHUI

Laŭ ĉinesko *Shuidiaogetou*\*

**Hosemo**

Aŭtuno venas,  
Blovas zefiro.  
Kiam luno plenas,  
Restas suspiro.  
Vi kiel fakiro  
Senlace ja penas  
Kun la aspiro.

Ĉineskon tenas  
Vi pioniro.

Al Viro  
Mi benas  
Per liro.  
Vin ĉagrenas  
Vi por bela inspiro.  
Kiu vin komprenas?  
Ho, via rapiro,  
Bela satiro!  
Mi sole splenas,  
Pro la sopiro.



## AL HOSEMO

laŭ ĉinesko *Shuidiaogetou*

**Guozhu**

Nacia Tago.  
Aŭtuno ora.  
El Hosemo venas  
kanto fervora.  
Kun preĝo sincera,  
pri Esperantismo  
pie adora.  
Profundan dankon!  
amiko fora!

Ĉinesko  
bel-sona,  
sonora.  
Min kortuŝas  
paseo kar-memora.  
Fidele laboru  
ni samideane  
kun ĵur' verdkora.  
Marŝu antaŭen!  
sub flago glora!

\* *Shuidiaogetou*: ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun versoj de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj laŭ rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa/xxa, xa, xxa, xa (x=senrima).

## El Libro de Poezio

# Kurba arbo

\**gratula kanto por edziĝanta viro dum nupto.*

Kurba arbo staras sude,  
Sur ĝi grimpas vetsarmento.  
Vin ni gratulas salute  
Bene dum nupt-momento!  
Kurba arbo staras sude,  
Sur ĝi volviĝas sarmento.  
Vin, novelzon, ni prelude  
Benas en ĉi-ĝojmomento!  
Kurba arbo staras sude,  
Sur ĝi rampas vitsarmento.  
Al vi feliĉplenon tute  
Benas ni en gaj-momento!



## Akridoj

\**gratula kanto por familio kun multaj filoj kaj nepoj.*

Flugiloj de akridoj  
Arege densas.  
Ho, viaj filoj, idoj  
Multe potencas.  
Flugiuloj de akridoj  
Grege sonbruas.  
Ho, viaj filoj, idoj  
Ja kontinuas.  
Flugiloj de akridoj

Grupe paradas.  
Ho, viaj filoj, idoj  
Svarme brigadas.


ĝi blovas al mi kaj ŝi

malplenigitis unu, kaj alia forblovitis

## Pompa persikarbo

*\*epitalamo por junulino edziĝanta*

persikarbo pompas brila,  
ruĝe sur branĉoj disfloras.  
Edziniĝas vi, ĝentila,  
Familon ja honoras.  
Persikarbo pompas brila,  
Ruĝe fruktoj pend-amasas.  
Edziniĝas vi, ĝentila,  
Familon bona lasas.  
Persikarbo pompas brila,  
Verdaj folioj sufiĉas.  
Edziniĝas vi, ĝentila,  
Familia viv' feliĉas.



Li Xiaoquan

## VENTO

al mi vento blovas  
tra fendoj rekte  
en ĉelon kaj alian ĉelon  
malplenigante pensoĉelojn  
kun kuirfumo kaj lamplumo

se tiel, ĝis ĉe l' aŭrorhor  
la vento blove min heligos

ĝi ŝajne blovas al knabino  
blovmovas ŝiajn orelingojn  
de ŝia dorso ĝis rendevuejo

## Spekti Nubojn

spektante nubojn, mi ne pensas pri vi  
metitas penshumoro sur herbej' ebena  
la nuboj kvazaŭ ĉar' ŝarĝita per onderoj  
kaj akvoplantoj, la kvieto neniam spertita  
dekoras posttagmezon

balon' paseo pendas sur herbero  
insektoj rampe tuŝas balonan malplenon  
en oreloj fluas nuboj, sensonigas  
tamburadon  
forprenas ili ĉiujn rememorojn

spektante nubojn, senzorgeme  
facile mi ignoras, kiam birdopreterflugis,  
lanugojn varmajn kaj flavetan bekon ĝiajn  
kaj la batad' de ĝia eta koro




## Krepusko Kreviĝas

krepusko kreviĝas pluvŝajne  
orflava fabguŝo de la horizonto  
diskrevas jen ĝis la kotvoj' de vilaĝo

toŭfu-vendistino en lamplumo  
kolporte elkrias la simplan vivstilon

la nigro tutkorpa  
sin kaŝas sub la tegmentrand' altpendanta  
virino eltiras ĉen-vipon el sia korp-eno  
je ŝia mansvingo tenera

tempdaŭr' ĉe fenestro  
ricevas cikatrojn ja neeviteble



elĉinigis **Longge**

## Por la Rideto de la Patrino

**Zhao Xiaohong**

Ŝi surportas veston kvazaŭ plastika pluvkostumo, kiu volvas streĉe ŝiajn membrojn kaj eĉ la kapon, lasante nur paron da oluloj ekstere. Ŝi laboras en varmega somera tago en la kampo de kuracherba plantaĵo. Oni diris, ke tia plantaĵo iritas onian haŭton, kaj ankaŭ bezonas defoliĝi ĉiutage. La ŝvitaj senĉese faladis de ŝiaj frunto, nazpinto kaj vangoj. . .

Ŝi estis mia kunlernantino, naskiĝinta en la kampara vilaĝo. Diplomiĝinte, ŝi ekhavigis al si propran entreprenon post longjaraj klopodadoj, kaj kvankam ŝi ne povas kalkuliĝi kiel granda entreprenisto, tamen ŝia kapitalo jam estas giganta sumo en la okuloj de tiuj, kiuj vivas en la maldisvolviĝintaj kamparaj vilaĝoj. Ŝiaj gepatroj ne kutimas al la vivo en la urbo, kaj ankaŭ ne volas akcepti la monon de la filino. Ili deponis la monon donacitan de infanoj en la bankon, kaj daŭre terkulturas diligente kaj ĝuas la vivon de sia propra forto. . .

Ŝi estas okupita de sia laboro, kaj vere ne facilas trovi tempon por viziti hejmen. Ŝi provis persevadi la gepatrojn, ke ili ne plu plantu medicinan herbon, sed la gepatroj ne konsentis pri tio, dirante, ke ili preferu sin vivteni. Ŝi volis dungi iun helpi en kamplaboroj, kaj ankoraŭ tion ne konsentis la gepatroj, dirante, "Ni ja havas

proprajn manojn kaj sanan korpon. Kio gravas la laceco? "

Ŝi povis fari nenion kontraŭ tio. Ĉifoje, reveninte hejmen, kiam ŝi vidis, ke la gepatrojn denove laboras en la kamparo, ŝi partoprenis per si mem. . .

Poste, ŝi diris tion al mi, kaj mi ridis, "Ĉu tio estas necesa? Vi je ne estas devigita. "

Ŝi diris: "Miaj gepatroj havas tian temperamenton, kaj se mi ne helpus en ilia laboro, kion alian mi faru por ili? kiel mi povu ĝojigi ilin? "

Mi rememoris la kanton — "por la rideto de la patrino. . . "

Mi eksentis hontegon.

Mi neniam pensis, kiel plezurigi miajn gepatrojn. Mi ĉiam opinias, ke mi jam faris bone — Ili ne plu maltrankviliĝas pri la manĝo kaj vestoj, kaj krome, mi ankaŭ elspezas tempon viziti ilin hejme. Nun, mi konsciis, ke mia fideleco estas ankoraŭ ne sifiĉa! Mi ne estas taŭga filino.

De post tio, la bildo de ŝia laborado en la kampo sub la varma suno ofte elmergiĝis en mian cerbon. Tio sciigis al mi, kiel ŝi kondutas al siaj gepatroj. . .



elĉinigis **Ebudhano**

◇\_◇

Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Adreso: Fremdlingva Fakultato, Nanhai Kolegio de Sud-Ĉina Normala Universitato, Nanhai, Guangdong 528000, Ĉinio

Tel: (0757) 86366253 (hejme)

E-poŝto: [vejdo@elerno.net](mailto:vejdo@elerno.net)

Ĉiujn kontribuadojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al [www.elerno.net/penlisto.htm](http://www.elerno.net/penlisto.htm) aŭ [www38.websamba.com/penseo](http://www38.websamba.com/penseo)

◇\_◇